11ª JARO No. 105. APRILO 1914.

Unum ovile et unus pastor.
Unu ŝafejo kaj unu paŝtanto.
(JOH., X, 16.)

ESPERO KATOLIKA

INTERNACIA MONATA GAZETO, OFICIALA ORGANO de I. K. U. E.

I.

INTERNACIISMO KULTURA KAJ SEKTANA.

Estas klare por ĉiu eĉ meze instruita homo, ke la nuntempa homaro ne staras senmove, ke ĝi evolviĝas, progresas, iras paŝo post paŝo al iu al ni nekonata celo.

La filozofo A. Comte nomis la homaron „Granda Estaĵo." Li ne estis tute malprava: la homaro ekzistas, do ĝi ne estas nur vorto, „Granda Nenio." Ĝi estas *io*, kvankam pli vere estus diri: ĝi *fariĝas io*.

La atenta esplorema spirito en tiu ĝia *fariĝo* facile ekrimarkos du grandajn *procesojn* de kontinua *diferenciĝo* kaj de ĉiam kveskanta *integriĝo*. La unua el ili diversajn elementojn de l' homara korpo kaj animo *erigas, disigas, dispecigas* la dua — ilin *arigas, kunigas, tutigas*.

Diferenciĝi ordinare signifas sin apartigi de la ĉirkaŭantaĵo, substreki sian malsimilecon je ĝi, kaj ĝenerale elmontri la deziron ekzistadi aparte, formi ian novan (nacian, religian, politikan aŭ alian) grupon, havantan siajn proprajn celojn, siajn principojn de kredo, siajn manierojn de pensado, de agado k. t. p.

Dank' al tio la diferenciĝo estas nepra kondiĉo de ĉiu deveno, de ĉiu fariĝo. Kio ajn ja devenas, fariĝas, tio ankaŭ nepre diferenciĝas. La diferenciĝo estas ĝenerala leĝo

de la kreitaĵo. En tiu ĉi lasta laŭ antikva saĝulo *„panta rei"* — ĉio fluas, do neniam estas la sama.

Paroli pli detale pri ĉiuj aperoj de diferenciĝo, ni kompreneble ne povas: ili ja estas senfine multaj. Por nia celo sufiĉos memorigi ĉi tie nur du plej konatajn produktaĵojn de l' diferenciĝproceso — la nuntempan *naciismon* kaj *sektismon*.

La naciismon oni definas, kiel altigitan nacian senton aŭ memkonscion. Dank' al ĝi la avoj da homoj sin turnas al amasoj da aliaj ilin ĉirkaŭantaj homoj kun jenaj deklaroj: *ni* ne estas *vi*; ni vin konsideras kiel *diversajn* de ni; vi estas *fremdaj* al ni; pro oftaj reciprokaj interrilatoj kaj proksima kunvivado kun vi, ni komprenas vian lingvon, sed ĝin ne ŝatas, ĉar ni posedas nian propran kaj preferas paroli hejme *nialingve* Pro tio ni estas *aparta nacio* kaj, kiel tia, deziras sendepende de vi ekzistadi, evoluadi, progresadi, krei nian propran kulturon, literaturon, arton k. t. p.

Tiaj naciaj „manifestoj" ne estas ia elpensitaĵo. Similajn deklarojn estas ja neunufoje farintaj diversaj malgrandaj nacioj al pli grandaj, enz. hungaroj kaj bohemoj — al germanaj, ukrainoj kaj poloj — al rusoj, finoj kaj norvegoj — al svedoj, litovoj kaj blankrasoj — al poloj, irlandoj — al angloj, flamandoj — al francoj, katalunoj — al hispanoj, bulgaroj — al grekoj k. t. p. k. t. p.

Dank' al tio naskiĝis multaj, ankoraŭ ĝis nun nesolvitaj *naciaj demandoj* (ukraina, litova, flamanda, kataluna, kroata k. a.), ĉar ĉiuj ĉi malgrandaj nacioj elmetas alte sian nacian idealon, neniu et ili deziras perei, kunfandiĝi kun siaj pli multnombraj kaj plikulturaj najbarnacioj. Diferenciĝinte de ili unu fojon, ĉiu malgranda nacio volas konservi sian lingvon kaj naciecon, plibonigadi la kondiĉojn de sia nacia ekzistado, resti por ĉiam vivanta, kulture laboranta membro de l' homaro. Kiel tia ĝi ne rifuzas interrilatiĝi kun aliaj nacioj, sed ĝi deziras, ke oni ĝin rigardadu ne kiel *turpe et mutum pecus*, ne kiel ian etnografian aĵon, taŭgantan nur por esti asimiligita de alia nacia organismo, sed kiel tute egalrajtan kun aliaj *nacianmonadon*, havantan en la homaro sian historian mision.

Nun ni aliru alian sferon — religian. Ĉi tie ankaŭ la proceso de deferenciĝo neniam ĉesas. Ĝin kaŭzas certe ne Dia elemento en religio, sed la homa. Dia elemento estas ja neŝanĝebla, sed ĝia kompreno en homaj animoj ĉiam aliiĝas. Malgraŭ diligenta zorgo de instruanta Eklezio aperas ofte inter fideluloj diversaj *nuancoj* de kredo; la nuancoj post iom da tempo naskas *diferencojn*, la diferencoj finiĝas per *herezoj* kaj *skizmoj*.

Tia estis la vojo, kiu en la XI centjaro disigis la Orientan kristanaron de la Okcidenta, en la XVI-a — ĵetis germanajn kaj anglajn popolojn en la ondojn de l' protestantismo, fine en la lastaj tempoj naskis modernismon, teosofismon, monismon, tolstoismon, mariavitismon kaj aliajn similajn produktaĵojn de glora nuntempa progreso, vere meritantajn belan nomon de nuntempa *sektismo*.

Kaj efektive rigardante el la flanko la nunan religian movadon en la mondo, ŝajnas, kvazaŭ Dia ĉefordono estus ne „vi estu fratoj kaj unuiĝu en Kristo", sed „vi, kiuj kredas Dion, fariĝu malamikoj, unuj de aliaj disiĝu, apartiĝu, malsamiĝu" . . . .

Estas neeble diri, kien alvenus la homaro, se ĝin kondukadus la naciismo kaj sektismo — tiuj du finaj ĉefsekvoj de unu granda, ĵus de ni priskribita difenenciĝproceso. Sole sur ĝiaj leĝoj sin fondante, la malfeliĉa homaro sendube estus jam longe disfalinta je *individuoj-atomoj*, ŝatantaj nenion, krom sia absoluta personeco aŭ pli vere arbitreco. Se ĝi ankoraŭ ne disfalis, ne devas pro tio danki la alian, supre de ni memoritan *integriĝproceson*, kiu ĉiam egalpezigas la efikon de diferenciĝproceso, ĉion de tiu ĉi lasta erigitan, disigitan, dispecigitan kontinue rearigante, reunuigante, retutigante. Por iom klarigi nian penson ni prenu la samajn ekzemplajn — de naciismo kaj de sektismo.

La nacioj, kiel ni supre estas vidintaj, dank' al sia altigita nacia sento, tendas ĉiam al aparteco, al izoliteco, al „solipseco." Ili deziras vivi solaj nur per si kaj por si, nenion zorgante pri la feliĉo de aliaj fremdaj nacioj. Tio estas natura sekvo de difenciĝproceso.

Sed samtempe la dua de ni dirita *proceso de integriĝo* kontraŭ la *idolo de naciismo* starigas *la idealon* de *unu* interne ĉiam solidara *homaro*, montrante ke la nacioj ne povas esti absolute apartigitaj, ke ilin ligas tre multaj — ekonomiaj, komercaj, industriaj, sciencaj, kulturaj, religiaj k. a. rilatoj. Se kelkajn el ili iu nacio forĵetus, ĝi per tio sama sin malfortigus, aŭ eĉ tute memmortigus. La nacioj komencas pli kaj pli klare tiun veraĵon kompreni, kaj pli ofte rigardadi sin mem kiel vivaj membroj de unu granda korpo-homaro, havantaj siajn specialajn funkciojn kaj historiajn misiojn. El tio jam per si mem naskiĝas la tre grava nuntempa ideo de *kultura internaciismo.*

Tiu sama integriĝproceso arigas ne sole naciojn, sed ankaŭ individuojn en ĉiu aparta nacio laŭ ilia homogeneco (en kredo, en pensado, en sin okupado k. t. p.) Dank' al tio en ĉiu aparta nacio sin formas grupojn de liberpensuloj, de teosofoj, de modernistoj, de monistoj, de masonoj k. t. p. Eksciinte, ke similaj grupoj estas ankaŭ sin formintaj en aliaj nacioj, ili komencos reciproke interrilatiĝi, proksimiĝi, unuiĝi. Kaj tiu ĉi spirita unueco, fondita sur la sameco de konvinkoj, ofte estas pli forta, ol fizika kunligo, bazita sur la sento de nacieco. Kiu ja ekz. nescias, ke al franco-masono pli proksima estas masono itala aŭ germana, ol lia samlandulo franco-katoliko.

Aplikita al religia sfero la granda leĝo de integriĝproceso: *similis simili gaudet* — el multaj diversnaciaj grupoj de samkreduloj faras grandajn kaj fortikajn grupegojn, kiuj sub la nomo de religiaj asocioj aŭ eĉ eklezioj ludas ofte tre gravajn rolojn en la historio de Eklezio kaj de homaro.

Kiel kunmetitaj el diversnaciaj elementoj, tiuj religiaj asocioj donas la komencon la *internaciismo religia* aŭ pli vere al la *internacia sektismo.*

En la tempoj antaŭaj la ambaŭ specoj de internaciismo (kultura kaj sektana) progresadis malrapide, ĉar ekzistis multaj baroj malhelpantaj la internaciajn rilatojn. Nune tiuj baroj estas preskaŭ forigitaj. La poŝta unuiĝo, le telegrafoj, la fervojoj, la vaporŝipoj, la aerveturado kunigas pli kaj pli la naciojn en unu aron. Hodiaŭ ekzistas jam neniu nacio

kultura, eĉ la plej malgranda, kiu ne havas internaciajn rilatojn. Tiamaniere la nuntempa *internaciismo* (kultura kaj sektana) fariĝas vere *tutmonda*. Tio ĉi estas fakto, kiun oni ne povas neigi. Ĝi kontraŭvole sin altrudas ankaŭ al ni katolikoj, kaj siavice naskas la demandon, ĉu ne estus jam tempo komenci la pli efikan organizadon de nia propra *katolika internaciismo*. Sed tion ĉi mi priparolos en alia artikolo.

Kovno 16, II, 14. P-ro A. DOMBROVSKI.

II.

LA INTERNACIISMO KATOLIKA.

„Internaciismo tutmonda aperas sur niaj okuloj" . . . . . (1) Ĝi ĉiutage kreskas, evoluas, progresadas. Ekzistas jam internaciismo komerca, turista, scienca, socialista, liberpensula, modernista . . . . Kial do ne povus hodiaŭ aperi ankaŭ la *internaciismo katolika ?*

La internaciismo nuntempa sin apogas precipe sur la ideo pri la frateco de popoloj, sed tiu ĉi ideo estas ja tute kristana. Tial la internaciismo katolika, kiel kristana, ne sole povas, sed ankaŭ devas hodiaŭ aperi.

La ideo pri la frateco de popoloj, abstrakte prenita, kvankam ĝi trovas multe da anoj, tamen restas ĝis nun vana revo. Tion klare elmontras barbaraĵoj de l' nuna militarismo kaj diversaj naciaj malamikemoj, pri kiuj ni ĉiutage legas en niaj gazetoj.

Por ke la dirita ideo pri universala frateco de kristanaj popoloj ĉesu esti vana revo kaj komencu efektiviĝadi, ĝi devas esti starigita sur ia neŝancelebla principo. Tiu ĉi principo povas esti nur la *universala fileco kaj fila obeado* al *la komuna Patro de ĉiuj veraj kristanoj.*

Belege tion ĉi elmontris la glora rusa filozofo Vladimiro Solovjev. Jen estas liaj propraj vortoj:

„Por altiĝi ĝis *universala* frateco, nacioj, registaroj,

---

(1) Revuo internacia N 3, p. 65—68.

monarkoj unue devas akcepti la moralan *filecon* de l' komuna *Patro*.... Por atingi la idealon de unueco perfekta, necese estas sin apogi sur la unueco neperfekta, sed reala, kaj antaŭ unuiĝi en libereco, kuniĝi en obeo."

De kio li konkludas: „La vera estonteco de l' homaro, por kiu ni devas laboradi, estas universala *Frateco*, naskita de universala *Patreco* per morala kaj sociala *Fileco*." (1)

Tiu ĉi penso de Solovjev, kiun liaj patrujanoj dum lia vivo malkomprenis kaj malbenadis, por ni katolikoj estas tre komprenebla kaj konata. La dezirata de la ortodoxsa filozofo „centro de unueco" en la kristanaro ekzistas ja en nia Eklezio jam de pli ol mil jaroj. Tiu ĉi „centro" kaj „komuna Patro" estas la Roma Papo, heredanto de Sankta Petro, episkopo de ĉiuj episkopoj kaj videbla kapo de nia Eklezio.

Havante en la persono de l' Papo unu komunan patron, difinitan de Kristo mem en la persono de l' apostolo Petro, la katolikaj popoloj estas *veraj fratoj en Kristo*. Ilia frateco estas jam ne ia nebula revo, sed tute plenumita fakto. La belegan elmontron de ĉiu ĉi fakto ni vidis antaŭ nelonge dum la ĵus pasintaj Romaj jubileoj, kiam el la tuta mondo grandegaj amasoj de diversnaciaj pilgrimantoj veturadis Romon por honorigi nian centron de unueco kaj saluti nian komunan patron Lian Papan Moŝton Pion X. Ĉe tiu nia komuna patro ni ĉiuj estis ja veraj fratoj.

Sed estante fratoj kaj havante komunan patron, ĉu ni diversnaciaj katolikoj jam atingis la *idealon de universala kristana frateco?* Ĉu ni devas nenion plu deziri?

La respondo al tiu ĉi demando ŝajnas al ni tre facila: ni devas deziri, ke ni pli kaj pli unuj aliajn povu komprenadi, kaj ke la voĉo de nia komuna patro estu al ni ĉiuj egale komprenebla. Nia katolika Eklezio estas grandega familio. Papo estas la patro, la popoloj rilate al Papo — filoj, rilate al si mem — la fratoj, sed *en unu familio devas esti ankaŭ unu al ĉiuj ĝiaj gemembroj komprenebla lingvo.*

---

(1) Vl. Solovjev. L' Idée russe. Paris 1888, 39—40 p.

Estus ja kontraŭnature aŭdi filojn de unu patro dirantajn unu al alia: mi vin ne komprenas, fratro."

Sed bedaŭrinde la dirita kontraŭnatureco ne estas ĝis nun forigita el niaj frataj rilatoj. Ni venas Romon gratuli nian komunan patron kaj rigardas unuj la aliajn kiel fremdulojn; ĉar italo ne komprenas francon, franco — germanon, germano — hispanon, hispano — irlandon, irlando — polon, polo — litovon k. t. p.

Certe ekzistas en nia Eklezio „lingvo latina, komprenebla al ĉiuj katolikaj pastroj. Tio ĉi estas tre bone. Sed la lingvo latina, estante lingvo de pastroj, en la nuna tempo jam ne sufiĉas. La Papo estas ja patro ne sole de pastroj (ŝafoj), sed ankaŭ de ĉiuj laikoj katolikoj (ŝafidoj), al kiuj estas nemalpli dezirinde, ke la komuna patro alparolu ilin en la komune komprenebla lingvo. Tiu ĉi lingvo videble ne povas esti itala, aŭ franca aŭ ia alia el vivantaj, sed sola *lingvo internacia*, kiel la plej alirebla al amasoj, ĉar la plej facila.

En la komenco de la Eklezio, la apostoloj, dank' al al supranatura dono de lingvoj, *estis komprenataj de ĉiuj* (Ak. Ap. II, 6—13). Nune tiu ĉi dono ĉesis. Sed la ofico „instruadi ĉiujn popolojn" por la heredantoj de la ĉefapostolo Petro, daŭradas ĝis nun kaj ĉesos nur kun la fino de l' mondo. Tial la Roma Patro *Apostola super ĉio,* bezonos ĉiam *esti komprenata de ĉiuj.*

Pro tio li espereble iam ekvolos uzi nian lingvon internacian, kiu ebligas al Li kompreni la parolon de siaj filoj, al la filoj — kompreni sian Patron kaj unuj la aliajn.

Kaj al mi estas klare, ke ju pli multe da katolikoj estos ellernintaj nian lingvon internacian, des pli proksima estos ankaŭ la tempo, kiam ĝin ekvolos ellerni ankaŭ nia patro komuna.

Jen estas la precipa fundamento por nia internaciismo katolika.

Krom tiu ĉefa motivo oni povas ankaŭ montri aliajn malpli gravajn, kiuj tamen igas nin katolikojn al pli energia alpropriiĝo de la lingo internacia. Unu el ili ni trovas en niaj pli kaj pli oftaj internaciaj katolikaj kongresoj — Marianaj, Eŭkaristiaj, Evangeliaj k. a. Ilin partoprenas ja

delegitoj aŭ memvoluloj nemalpli ol el 10—20 diversaj nacioj. En tiuj kongresoj estas legataj interesegaj raportoj pri tre gravaj demandoj, diradataj elokventegaj paroladoj, predikoj je tre aktualaj temoj. Ĉio ĉi sendube alportas utilon al la diversnacia kongresanaro. Sed tiu utilo estus multe pli granda, se oni povus ĉiujn raportojn, paroladojn kaj predikojn aŭskulti ne en 4—5 diversaj lingvoj, kiel ordinare okazas, sed en *unu solo al ĉiuj komprenebla internacia lingvo.*

Aliflanke — kiu nun ne scias, ke tra la nuntempa mondo iras forta voko: „Ĉiuj diversnaciaj kontraŭuloj de la Eklezio, vi unuiĝu kontraŭ ĝi"! Tiu-ĉi voko bedaŭrinde, ne restas la „voĉo de l' klamanto en dezerto". Dank' al tio ĉi la vizio de S. Ignaco pri du standardoj fariĝas pli kaj pli proksima al la realeco. Kion do fari?

Antaŭ ĉio ni devas ankaŭ alte klamadi: „Katolikoj de ĉiuj naciaj vi unuiĝu pli fortike, arigante viajn spiritajn kaj materialajn fortojn!" Tiujn vokojn ni jam aŭdis ne unufoje.

En nia unua Kongreso en Parizo estis movigita la demando pri la internacia *organizo de katolika kapitalo.* En nia kvara, oni proponis la kreon de internacia *katolika telegrafa agentejo*, en nia dua kaj tria estas priparolataj diversaj demandoj pri la internacia *socia katolika agado.* Lia Papa Moŝto Pio X mem en sia encikliko pri la modernismo esprimis la deziron pri la organizo de *internacia societo de katolikaj scienculoj.* Ĉiuj ĉi tiaj deziroj ĝis nun restas ne-efektivigitaj. Ĉu ilin devas ni lasi en tia stato por ĉiam? Ne, ni devas ilin efektivigi. Sed por ke ni povu ĝin fari pli baldaŭ, estas necese, ke la lingvo internacia disvastiĝu inter ni katolikoj la plej multe. Ĉar ĉe la nuntempa multlingveco ĉiuj supre diritaj grandaj projektoj de katolika internacia organizo aŭ estos multege malhelpotaj aŭ eĉ tute neefektivigeblaj.

Ĉar *unuiĝo* sen reciproka *kompreniĝo* estas absolute neebla. Do kiu deziras la celon — la unuiĝon de l' tutmonda katolikaro, devos ankaŭ deziri la internacian kompreniĝilon en la formo de la lingvo internacia.

Pri ĝia utileco por ni katolikoj estas neeblaj du malsamaj opinioj. Nia neforgesinda abato PELTIER jen kion estas dirinta pri tio ĉi:

„Kia utilo por ĉiuj pastroj, kia forto por la tuta Eklezio, kia bono por ĉiuj animoj, se ĉiuj kristanoj, de unu lando al alia, sin komprenus reciproke; se ĉiuj gemonaĥoj, gemisiistoj instruadus ĉiujn infanojn per sama facilega lingvo, se la bonaj libroj ĵus verkitaj de katolikoj eminentaj *tuj* estus tradukitaj en sama idiomo; se la diversnaciaj anoj de societoj pacigaj aŭ civilizaj povus korespondadi per lingvo neŭtrala de ĉiuj akceptita"...*)

Ripetante tiujn ĉi piajn dezirojn de nia unua prezidanto, mi finas per la espero, ke ni katolikoj ne estos plu tiel ŝanceliĝemaj en la akcepto kaj la uzo de tiu granda agadrimedo, kiun al ni liveras la progreso en la formo de nia kara lingvo Esperanto, kaj ke la plendo de abato PELTIER pri tio, ke ni katolikoj ordinare nur tiam ekmarŝas, kiam niaj kontraŭuloj jam de longe nin estas antaŭenirintaj sur la vojo, neniam praviĝos. Fiat, Fiat!

P-ro DOMBROVSKI.

Kovno, 16 Febr. '14.

*) Esp. Kat. No. II pag. 6.

LA RENKONTO.

Je la tagiĝo ŝovis sin du malhelaj personoj la straton Appian al la ebenaĵoj de Campagna. Unu el ili estis Nazario, la dua Petro Apostolo, kiu estis forlasanta Romon kaj la en ĝi turmentatajn samkonfesanojn.

Sunleviĝe surprenis jam la ĉielo delikatete verdan duonombron, kiu malrapide, pli kaj pli difinite, borderiĝis malsupre per safrana koloro. La arboj kun foliaro arĝenta, la blankaj marmoroj de somerdomoj kaj la akvokondukaj arkoj, urbon trans la ebenaĵo kurantaj, elklinis sin el la ombro. La verdo de la ĉielo klariĝis iom post iom, satiganta

sin per oro. Poste la sunleviĝo komencis roziĝi kaj lumigis la Albanan Montaron, kiu sin montris mirinde bela, lilia, kiele el briloj mem kunmetita.

La tagiĝo respeguliĝis en sur la arbfoliaro tremantaj rosogutoj. La nebulo maldensiĝis, aperigante pli kaj pli vastan perspektivon super la ebenaĵo, super sur ĝi kuŝantaj domoj, tombejoj, urbetoj kaj tufoj de la arboj, inter kiuj blankis la kolonoj de temploj.

La strato estis dezerta. Vilaĝanoj, kiuj veturigadis legomojn al la urbo, evidente ne povis ankoraŭ sufiĉe frue antaŭjungi la veturilojn. De la ŝtonaj platoj, per kiuj la strato ĝis al la montaro estis kovrita, kuris en mallaŭto la resono de la lignaj sandaloj, kiujn la vojaĝantoj sub piedoj havis.

Poste la suno elkliniĝis trans montarkavon, sed samtempe mirinda vidaĵo ekbatis okulojn de la Apostolo. Jen ekŝajnis al li, ke la orega disko, anstataŭ sur ĉielo supren kaj pli supren leviĝi, sin deŝovis de la montaro kaj ruliĝas sur la strato.

Tiam Petro haltis kaj diris: „Ĉu vidas ci tiun lumegon, kiu al ni proksimiĝas?"

„Mi nenion vidas", respondis Nazario.

Sed Petro post momento alparolis, priŝirminte okulojn per la manplato: „Iu persono iras renkonte al ni en sunbrilo".

Al iliaj oreloj tamen ne alvenis eĉ la plej malgranda resono de iaj paŝoj. Ĉirkaŭe estis kompleta mallaŭto. Nazario vidis nur, ke en malproksimo tremas la arboj, kvazaŭ iu ekskuadus ilin, kaj la brilo disverŝiĝas pli kaj pli vaste sur la ebenaĵo.

Kaj de Petraj manoj elfalis teron la vojaĝa bastono, la okuloj rigardis senmove antaŭen, la buŝo estis malfermita, sur la vizaĝo pentriĝis mirego, ĝojo, raveco. Subite li ĵetis sin genuen kun la antaŭen etenditaj brakoj kaj de liaj lipoj eliris la ĝojkrio: „Kristo!... Kristo!..." Kaj li faligis la kapon al tero, kvazaŭ li kisus ies piedojn.

Longe daŭris silento, ĝis en la mallaŭto eksonis per plorego interrompitaj vortoj de la maljunulo: „Quo vadis, Domine?... Kien Vi iras, ho Sinjoro?..."

Kaj ne aŭdis la respondon Nazario, sed al Petraj oreloj alvenis malĝoja kaj dolĉa voĉo, kiu diris: „Ĉar vi forlasas popolon mian, Romon *mi* iras por esti krucifiksota fojon *duan*".

La Apostolo kuŝis surtere kun vizaĝo en polvo, sen movo kaj vorto. Al Nazario ŝajnis jam, ke li svenis kaj mortis; sed li levigis sin fine, per tremantaj manoj li suprenprenis la pilgriman bastonon kaj nenion dirante li reiris, en la direkto de la „sep montetoj" de la urbo.

Kaj la knabo tion vidanta ripetis kiel eĥo: „Quo vadis, Domine!..."

— „Romon" — rediris mallaŭte la Apostolo. Kaj li revenis.

El „Quo vadis" de H. SIENKIEWICZ.
Trad. FRA EUGENIO.

Heiligenkreuz,
la 4-an de Februaro 1914.

Ekskursoj kaj Pilgrima Vizito
al la
Sanktaj Lokoj de l' Eterna Urbo dum „Nia Kvara".

Daŭrigo.

S. Croce en Jerusalemme I.

Unu el la 7 ĉefpreĝejoj de Romo estis konstruita jam en la 4a jarcento de l' imperiestro Konstantino (330), laŭ peto de lia patrino en la ĉirkaŭumo de la muroj de l' palaco imperiestra Sessoriana. En 720 la tekto de la flanka ŝipo estis konstruita per arkaĵoj. En 1144 kaj 1432 okazis renoviĝoj, en 1743 stilŝanĝo en „Barock". —

Dekstren pedelo kondukas al la kapelo de la S. Helena, kien la imperiestrino estis alportiginta teron de la „monto kalvaria".

Estis ĉi tie, kien eniri al la virinoj ne estis permesite. Mi ne dubas, ke la granda krado ĉe la enirejo, tra kies truoj niaj pilgrimaj akompaninoj kun tiom da melankolio

kaj scivolemo rigardegadis, estos restata en via memoro. Kelkaj inter ni opiniis eĉ scii, ke S-ta Helena mem esprimis rilatan deziron. Oni elparolis ankaŭ la „kialon“. Sed mi vere ne kuraĝis pensi aŭ diri plion pri ĉi tiu iomete delikata temo. Alie niaj estimataj inoj opinius, ke diversaj sinjoroj estus registrintaj ĉi tiun fakton kun iu interesiĝanta ĝojeto. Kontraŭe mi povas certigi, ke tia domaĝo-ĝojo tutege ne ekzistas ĉe viroj!

En aliaj kapelo de ĉi tiu preĝejo troviĝas en granda fera ŝranko po unu najlo, spino, krucero kaj aliaj tiom valoraj martiriloj, uzitaj laŭ tradicio dum la mortigo de nia Savinto. Kopiaj modeloj, tuŝintaj la veran najlon, estis aĉeteblaj po 0.4 Sm.

De S-ta Kroce en Jerusalemo nur tre mallonga vojo, preter la grandiozaj ruinoj de la „akvoj klaŭdianaj“ kaj la „amfiteatro kastrense“ nin irigadis ĉe l'

„Porta di S. Giovanni in Laterano“

(„placo de S. Johano en laterano“).

La rigardo de ĉi tie trans la malnovan ruĝbrunan urbmuron estas speciale direktinda al la Albanaj kaj Sabinaj montoj.

Norde unue presentiĝas la granda monumenta palaco de de S-ta Johano en Laterano, oriente la „Leonianum Triklinium“ kaj la “scala sankta“.

Trinklinium Leonianum

niĉa konstruaĵo el 1743 kun zorgema kopio de la mozaikoj el la meza podio de la manĝejo, konstruita de Leo III (798), kie manĝadis la tiamaj imperiestroj, alvenintaj ĉe la papoj. Ĝi estas parto en la malnova palaco de la laterano, valora je la vidpunkto de l' eklezia historio. La enskriboj speciale valoras koncerne la paphistorion. Ĝi estas pruvoj por multaj antikvaj kaj mezjarcentaj faktoj. El la granda amaso de ĉi tiuj enskriboj mi nur rimarkigas jenan interesan frazon:

„Mortinta Petro donu vivon al la papo Leo kaj venkon al la reĝo Karlo“.

Supre ĉi tiuj vortoj troviĝas portreto de Petro, kiu per la dekstra mano transdonas al papo Leo III, la stolon kiel

signon de la papaj povoj, kaj per la maldekstra al la reĝo Karlo, kiel ŝirmisto kaj ĉefjuĝisto de l' urbo, standardon.

Aliflanke de la placo ni venis ĉe la

"Scala sankta" („sankta ŝtuparo")

(kun la kapelo „sankta sanktorum"). Estas la ŝtupo de l' Pilata domo el Jerusalem, kiujn la imperiestrino S-ta Helena en 326 Romon alportigis kaj kiujn poste la Papo Sergius II en la jaro 845 kunmetigis. La meza ŝtuparo estas la „sancta ŝtuparo" („sancta scala"), super kiu Kristo komencis la „dolorvojon" kaj supre kiu li, kiel „Ecce homo" staris. Oni nur genue supreniras. Ĝi estas kovrita per traborita ligno. Tra tri truoj vitre fermataj oni vidas sanggutojn. La moderna dekstra flankŝtuparo konkudas al „Capella sancta sanctorum", la siatempe al honoro de S. Lorenzo dediĉita domkapelo de la Papoj kaj trezorejo de la ĉefaj relikvoj. Post la bruliĝo de l' jaro 1277, Niklaus III renovigis ĝin en la sama arĥitekturstilo. Tiu parte tial estas la sola kompleta interna konstruaĵo, kiu konserviĝis je la tempo de la „Cosmatoj." Ĝi estas ornamentata en gotika stilo kun 55 vindataj kolonoj. Gotikaj arkaj-pintoj cirkaŭumas duope 28 bildojn de sanktuloj kaj martiroj. Super la altaro estas tabernaklo sur du porfirkolonoj, valora mosaiklaboro, kaj Malnova Kristobildo je Cederligno.

La preĝejo de l' laterano, „la katedralo de l' episkopo de Romo", jam estis konstruita sur la sama placo de la episkopo Silvester kiel „Basilika S. Salvatoris" („de nia Savinto"). Konstantino ĝin donacis al la episkopo. 324 okazis la konsekrigo. La titolon „preĝejo de l' „Baptisto" kaj „Evangelisto Johano", ĝi nur en 1144 ricevis; pli poste oni kreis la ankoraŭ pli gloran nomon: „altsankta lateran-preĝejo, de ĉiuj preĝejoj de l' urbo kaj de l' terglobo patrino kaj ĉefo."

Hodiaŭ nur tre malmulte estas konservata de la originala konstruaĵo.

Cetere la preĝejo jam tiam havis kvin ŝipojn. Pli aŭ malpli grandaj renovaĵoj okazis en la jaroj 423 kaj 455. En la jaro 845 estis ĉi tien alportita la ŝtupara sankta." En la jaro 907 rekonstruiĝis la preĝejo. Niklaŭs IV. ĝin

renovigis en 1289. En 1308 bruliĝis preskaŭ ĉio. Apenaŭ denove starigita, ĝi denove en 1361 rebruliĝis. Kiam Gregoro XI estis reveninta el Avignon, li reparigis ĝin en 1374. Tiam la preĝejo ricevis la flankenerejon ĉe la dekstra transversala ŝipo. En 1421 ankaŭ plafono kaj planko renoviĝis. En 1440 Eugeno IV. konstruigis la sakristejon, Pius IV (1560) la du pentrindajn sonorileg-turojn, Sixtus V. la duoblan pordegon ĉe la nordfasado, la domegon de la ŝtuparo sankta kaj la palacon lateranan. Klemens VIII per „Giacomo della Porta" ŝanĝigis la konstruaĵon de la transversala ŝipo. Innocenz X por la Jubileo 1650 farigis per Corromini la barokan dekoraĵon de l' interno kaj la ĉirkaŭmurigon de la kolonoj.

La interesa ĉef-fasado kaj la kapelo „Corsini" elp. korzini) estas la verko de Klemens XIIa (Corsini) en 1734.

Tiamaniere la preĝejo estas miksaĵo de renovaĵoj el tute diversaj tempoj. De la pli frua tempo hodiaŭ preskaŭ nur restadis la mosaikoj de la tribunoj kaj la Leo' na koridoro ĉe la tribuno.

La ĉef-fasado, tute el travertino, estas grandioza verko de Alexandro Galilei (elp. Aleksandro Galilej), komencita en 1735. En la ĉirkaŭumo de la grandaj pilastroj, la kvin arkoj de la plej supra „Loggia" kaj la kvin koridoroj de la plej malsupra antaŭhalo estas harmonie enkonstruataj. La balustrado portas 15 statuojn de Kristo kaj sanktuloj. En la antaŭnomita imponanta antaŭhalo troviĝas eble la plej belega statuo de l' imperiestro Konstantino.

La impreso de la kvin-ŝipa interno, kiu formas latinan krucon (*), unue per la grandeco kaj beleco de l' meza ŝipo (16 metrojn larĝa kaj 86 metrojn longa) surprizas; sed la singulaj barokaĵoj malhelpetas la ĝuon de la grandiozeco de l' tuto. Feliĉe Borromini almenaŭ ne detruis la splendidan ligno-tektilon (plafonon), kies kolorharmonio kaj oro-riĉeco estas tiom laŭdata de arĥitektoj.

(*) Jen la formo de la latina kruco: en kontraŭposto al la greka kruco:

La planko el porfiro, „serpentino“ kaj granito estas memoraĵa verko de l‘ papo Martin V. el la jaro 1420.

Oni permesu al mi, ke ĉi tie mi aldonu, ke ekzistas tute proksime de mia patra urbo trans la riveroj de la „Goldach“ ponto, kiu portas la nomon „Martinsbrücke“ t. e. „Martin-ponto“, ĉar la posta papo, Martin V-a, irinte Romon pro la „Konklavo“, (laŭ la popoltradicio) trapasis ĉi tiun ponton. Estas la sama ponto, kiun konstruis la mondkonata Notker el la monaĥejo *St. Gallen*; Vi certe scias la memorindan verson farita dum la konstruado de l‘ ponto:

„Media vita in morte sumus k. t. p.“

(En la mezo de la vivo la morto nin atendas k. t. p.“).

Cetere pri la laterano mi nur povas Vin rememorigi ankoraŭ al la „Capella Torlonia,“ al la monumento de l‘ portugala kardinalo Antonius de Clavìbus (+ 1447), al la tombejo de l‘ konata humanisto kaj laterana kanoniko Laŭrencius Valla (+ 1457), al la monumento de Henriko IVa el francujo, farita de „Condieri“ kiel dankaĵo por la de Henriko donacita abatejo „Clérac“.

La grandaj mosaikbildoj de l‘ laterano denombriĝas inter la plej valoraj de Roma.

La „Leona pordegejo“ estis en la jaro 1228 konstruita kaj en 1386 en gotikaj formoj renovigita.

Grandega freskobildo de „Grande“, montranta audiencon de la kardinaloj, kiuj direktadis la ŝanĝon de la Apsis dum la lastaj 50 jaroj, de Leo XIII, nin revokas en memoron, ke en la laterano jam estas preparata granda tombejo por akcepti la ĉerkon, kun la kadavro de Leo XIIIa, kiu hodiaŭ ankoraŭ troviĝas en la preĝejo de S. Petro, atendante tie super la sakristia enirejo (laŭ regula maniero) la morton de la papposteulo.

Estus ĉi tie la loko, por skribi vorton pri la grandegaj koncilioj ekleziaj, kiuj okazis en la laterano. Sed mi ne estas teologo kaj en la nuna momento mi ne volas paroli pri internaj ekleziaj aferoj. Tial mi petas, ke teologo iu ajn en la proksiman numeron de nia K. E. ensendu artikolon pri la „lateranaj koncilioj.“

Mi do esperas, ke iu rilata artikolo (de pli kompetentulo)

en numero 106 de E. K. estos la bona kaj necesa kompletigo de mia tro modesta rakonto.

Cetere adiaŭ por nun! ĝis revido en proksima numero.

D-ro LEHNER.

Notoj pri Lourdes

la lando de mirakloj.

Daŭrigo.

V.

La Sanktejoj.

La *Baziliko* estas konstruita super la Groto, sur la Massabielle'a roko [1]) laŭ la XIII-a jarcenta stilo. Laborojn direktis la arĥitekturisto Hippolyte DURAND. Ĝi estas longa da 51 metroj, kaj larĝa da 21. Ĝi havas nur unu navon, sed ĉiuflanke estas multaj kapeloj komunikantaj inter si per imitaĵa „triforium" kaj kvin ĥorejoj ĉirkaŭantaj la ĉefan ĥorejon. Oni estas mirigita pro la vidaĵo de 300 flagoj, kiuj ornamas ĝin, la standardoj je naciaj koloroj de la ĉefaj landoj de la mondo, la dankmemoraĵoj multnombraj, kiuj rekovras ĝiajn murojn, k. t. p. La ĉefaltaron el blanka marmoro superstaras admirinda statuo de nia Sinjorino; 20 lustroj kaj 12 pendlampoj ornamas la ĥorejon. - En la kapelo de la Sanktega Koro de Jezuo, la statuo estas la verko de CABUCHET. Remarkinda estas la grupo de TABISCH en la kapelo de nia Sinjorino de la Rosario. — La koloraj vitrofenestroj de la navo prezentas la historion de la Senmakulino, tiuj de la kapeloj la historion de la Pilgrimejo. — Rimarkindaj estas ĉe la Sanktejo la du grandaj vitrofenestroj duopaj: dekstre la Sankta Promeso de Ludoviko XIII, maldekstre la triumfo de Judith, en la navo la Anunciacio kaj la Vizio de Elie ĉe la Karmelmonto. — La katedro estas el kverko de Kanado. — Orgeno estas

[1]) Masabielle signifas: antikva roko.

farita de Cavaillé-Coll, ĝi havas 25 tubarojn. — Oni povas vidi ĉe la sakristio la hostimontrilon nekomparan (1 m. 25). Ĝi esprimas per ĝia aranĝo kaj ĝiaj detaloj la rilatojn inter la Sankta Virgulino kaj la Eŭkaristio. Oni kalkulas 63 figuraĵojn, 1033 diamantojn, 15 smeraldojn, rubenojn, ametistojn, 462 rozkolorajn topazojn, sume 2810 trezorajn ŝtonojn. La krono de nia Sinjorino de Lourdes kun ĝiaj 12 steloj el diamanto, la palmobranĉo donacita de Pio IX estas ankaŭ videblaj ĉi-tie.

Ekstere de la Baziliko, super la pordego, estas portreto de Pio IX el mozaiko, farita en la Vatikanaj laborejoj. Ĉe la perono, oni ĝuas belegan vidaĵon; kontraŭ esplanado, la urbo kaj ĉe la horizonto, la malproksimaj pintmontoj de Ardiden de Viscos, pli proksime la granda kaj la eta Jer, la Kalvario, la torento, la monaĥejoj, k. t. p., k. t. p.

La *kripto* de la Baziliko estis kavigita en la roko. Inter la koridoroj kaj la roko, kies la flankoj hakitaj estis vertikale, 23 lampoj lumas la sanktejon. Ĉio estas grava kaj preĝema. Oni tie vidas multajn dankmemoraĵojn, precipe rozarion aparteninta al la Pastro de Ars.

La preĝejo de la Rosario utilas kiel piedestalo al la Baziliko. Ĝi konsistas el 15 kapeloj honore al la 15 Misteroj. Ili estas ornamitaj per belegaj mozaikoj, kies la aranĝo estis komisiita al S-ro MELCHIOR DOZE de Nîmes. Estas en la preĝejo de la Rozario ke okazas la noktaj adoradoj. La sanktejon superstaras kupolo kun kampanilo.

Ĉe la panilo de la pordego, malaltaj reliefoj prezentantaj la Sanktan Virgulinon, donante la Rozarion al Sankta Dominiko. La Preĝejo kaj la dioncirko estas la verko de HARDY.

La Preĝejo de la Rozario konsekrita estis solene la 6-an de oktobro 1901 de S. E. Kardinalo LANGENIEUX, speciale delegita de L. S. Papa Moŝto LEONO XIII.

La *Paroĥa Preĝejo*, kiu estis konstruita de Mons. PEYRAMALE, paroĥestro dum la apera periodo, havas 14 kolononj el marmoro. Kripto enhavas la korpon de Mons. PEYRAMALE. La pilgrimantoj ŝatas preĝi antaŭ lia tombejo.

(*Daŭrigota*). MAX ROUB.

Oficialaj Komunikoj.

V-a Internacia Kongreso-Pilgrimo de la Katolikaj Esperantistoj en Lourdes

(12—17 Aŭgusto 1914)

Sub la alta Patronado kaj Honora Prezido de L. E. M. Monsinjoro SCHŒPFER, Episkopo de Tarbes kaj Lourdes.

3-a LETERO CIRKULERO.

Karaj I. K. U. E.-anoj!

Laŭ la deziro esprimita de nia kara ĉefredaktoro de E. K. mi uzas ĉiumonate nian oficialan organon por doni, nome de la organiza komitato, la bezonatajn informojn rilatajn al nia okazonta kongreso, kaj por respondi la diversajn demandojn, kiujn, el diversaj nacioj, oni faras al ni pri unu aŭ alia punkto.

Antaŭ ĉio, mi permesas al mi peti vian *rapidan*, kiel eble plej *baldaŭan* aliĝon.

Tre grava estas la demando pri *hotelo*. En Romo, ni havis la .grandan feliĉon, loĝi ĉiuj en la sama gastejo: Dank' al tio, la plej granda intimeco katolika kaj esperantista regis, dum la tuta ĉeestado, inter ni. Nia tablo ĉiam estis *ĉarma renkontejo*, kie, gefiloj de multaj diversaj nacioj, ni frate konversaciis en nia kara komuna lingvo. Plue, por doni informojn, akcepti eminentajn gastojn, kuniĝi por kunsidoj aŭ ekskursoj, tiu sistemo estas *la plej praktika*, kaj evitigas multe da ĉiuspecaj malfacilaĵoj. Fine, la kongreskomitato povas zorgi pri ornamado de la hotelo per Esperantaj flagoj, skribaĵoj aŭ festgirlandoj.

Nepre ni devas en Lourdes praktiki tiun sistemon. Cetere, inter la miloj da pilgrimuloj, kiuj ĉeestos en Lourdes en la sama epoko, niaj kongresanoj estus, sen tiu sistemo,

absolute disperditaj, kaj neniam ni povus taŭge kuniĝi, ĉu por procesioj, ĉu por kunsidoj.

Sed ni povos fari tiun aranĝon en *bonegaj kondiĉoj*, nur kiam ni povos certigi al la elektota hotelo iun difinitan nombron da kongresanoj. Ju pli frue ni ricevos viajn aliĝojn, des pli taŭge ni povos ĉion aranĝi.

Cetere, karaj geamikoj, eĉ se vi ne estas certaj ĉeesti, — *eĉ se vi estas certaj ne ĉeesti*, — ĉu vi povus heziti pagi vian aliĝon al nia kongreso, kaj tiel *partopreni* vere, efektive, al la sukceso de la manifestacio, kiu celas honori per nia Esperanto, la sanktan Virgulinon? [1])

INFORMOJ.

Kongresmarkoj, kartoj, afiŝoj. — La organiza komitato decidis fari, tiun-ĉi jaron, la necesajn monoferojn, por ke ni havu *vere artajn* kongresmarkojn kaj propagandajn poŝtkartojn, indajn de nia grava kongreso.

Ĝi do sin turnis al konata artisto, (la ĉefdesegnisto de la plej grava eldona firmo Pariza), kiu, post kelkaj tagoj, liveros al ni la menditajn desegnojn, por markoj kaj poŝtkartoj.

El du tipoj diversaj konsistos la markoj: unu prezentos la bazilikon de Lourdes, alia montros la miraklan Virgulinon, kun artaj ornamaĵoj kaj surskribaĵoj en Esperanto. Diversaj kombinoj de koloroj estos faritaj. La presado estos certe finita antaŭ Pasko.

Ĉiu aliĝinto ricevos senpage tuj post presado, 1 kongresafiŝon, 3 kongresajn poŝtkartojn, 30 kongresmarkojn.

La prezo, por plua aĉeto, estos:

12 postkartoj: afrankite fr. 1.25 (Sm. 0.50)
100 markoj: fr. 1.— (Sm. 0.40) (afrank.)
Ĉiu afiŝo: fr. 0.25 (Sm. 0.10) (afrank.)

Internacia kongreskomitato. — Ni rememoras, ke, por helpi al la *Organiza Komitato,* la organizantoj nepre de-

---

[1]) Ĉiuj, kiuj estos pagintaj la aliĝon, (2 Sm.) rajtos ricevi (*eĉ se ili ne ĉeestos*) la kongreslibron, insignon, markojn kaj diversajn presaĵojn de la kongreso.

ziras ke, kiel eble plej ageme funkciu la *internacia komitato*, kiu jam pli aŭ malpli funkciis la lastan jaron. (Tiun komitaton kreis la Haga kongreso).

La *internacia komitato* konsistas:

1-e. El la Prezidanto kaj Sekretario de I. K. U. E. kaj el la redaktoro de E. K.

2-e. El unu membro de ĉiu nacia sekcio de I. K. U. E.

Ilia rolo estas la jena:

a. Rilatiĝi kun la organiza komitato, kaj ĝin helpi per diversaj apogoj, konsiloj, k. t. p.;

b. Fari, ĉiu en sia respektiva lando kaj lingvo, ageman propagandon por la kongreso, ĉu en katolikaj ĉu en Esperantistaj medioj, per gazetartikoloj, paroladoj, k. t. p.;

c. Kolekti aliĝojn, kaj zorgi pri la vojaĝo de iliaj samlandanoj al la kongreso.

Principe, ĉiu nacia membro de la komitato devas esti delegita *ad hoc*, de la naciaj I. K. U. E.-anoj.

La membroj ĝis nun dezignitaj de tiu Internacia Komitato estas:

Por Germanoj: S-ro Pastro Becker.
Por Katalunoj: S-ro D-ro Coll.
Por Italoj: S-ro Pastro Bianchini.
Por Irlandanoj: S-ro Prezidanto Parker.
Por Nederlandanoj: F-ino Borret.
Por Rusoj kaj Litovoj: S-ro Pastro Dombrovski.

(Ni deziras koni la membrojn por ĉiuj aliaj ne dezignitaj nacioj).

Honora Patronanta Komitato. — Tiu komitato, kies nombro de membroj estas nedifinita, devas konsisti el tre eminentaj katolikoj, episkopoj, pastroj, de ĉiuj nacioj. Bonvolu ĉiuj niaj amikoj zorgi, por ke estu *kiel eble plej multaj* la Honoraj Komitatanoj de nia kongreso: sufiĉas eble vizito, letero, aŭ renkonto kun tiaj eminentuloj por obteni, ke ili bonvolu doni al ni sian nomon kaj moralan apogon.

Lia Episkopa Moŝto, Monsinjoro SCHŒPFER, episkopo

de Lourdes kaj Gardisto de la Sanktejo, estas rajte Prezidanto de tiu Honora Komitato.

Floraj Ludoj. — Ni ĝojas, ke nia propono pri katolikoj Floraj Ludoj ricevis, ĉe niaj amikoj diverslandaj, la plej entuziasman akcepton.

Krom la oficiale proponita temo (*poezio* pri la S. Virgulino), kaj la premioj oferitaj de la *Ligo de la Evangelio* por traktontoj de la temo: „*La Sankta Virgulino kaj la Evangelio*", kun granda ĝojo ni sciigas, ke *Nederlanda Katoliko* oferos ankaŭ du premiojn por traktado de tiu ĉi temo: „La Sankta Virgulino kaj la Maristoj", kaj *Espero Katolika* same por: „La Sankta Virgulino, helpo de l' Kristanoj" (Auxilium Christianorum).

Mondonacoj. — Ni rememoras, ke nia kongreskasistino ricevas bonvolajn mondonacojn por aĉeto de bela Esperanta standardo lasota ĉe la Baziliko de Lourdes, kaj gravurado en la Baziliko, de memora surskribaĵo en Esperanto. La ricevota mono estas plene utiligita.

Ĉiu nacio devas konsideri *kiel honoron kaj patriotan devon*, partopreni en tiu internacia honorigo al la Sankta Virgulino! *Eĉ la plej malgranda sumeto* estas dankeme akceptota. La nomoj de la donantoj estos publikigitaj ĉiumonate en E. K.

Tombo de Abato Peltier. Ĉiu Esperantisto scias, ke la pia fondinto de nia movado kaj de nia centra gazeto dormas sian lastan dormon en la tombejo de Lourdes, kie li malriĉa mortis.

Nur ligna kruco ombrigas la teron, sub kiu liaj restaĵoj ripozas, kaj, — ho ve! — tiu lignaĵo mem, kies piedo jam konsumiĝis, baldaŭ falos, kiel falis la surskribaĵo enhavanta lian nomon.

La Esperantistoj, — kaj ĉefe la katolikaj Esperantistoj, — estus la plej maldankemaj homoj, se, al tiu fervorega pioniro, kiu sian sanon, sian monon, sian vivon, elspezis por Esperanto, ili ne dediĉus al li pli indan tombon. Ho! ankaŭ por tio, ĉiu el ni alportu *obolon*, por montri, ke ni ne

forgesas niajn antaŭulojn, kaj ke la ligilo de amikeco kaj dankeco, kiu unuigis nin kun ili, daŭras ankoraŭ, trans la tombo.

Ĉu „honori la mortintojn" ne estis ĉiam konsiderata kiel grava kristana devo?

Cl. COLAS,
Ĝenerala sekretario de la kongreso.
7 rue des Marronniers, Montmagny (S. et O.) apud Paris.

Ni rememorigas, ke la adreso de nia kasistino estas: F-ino LARROCHE, 55 rue de Vaugirard, Paris.

Unua nomaro de Aliĝantoj (ĝis la 18-an de Marto.)

Rev. Preposto Becker, Bromberg . . . . . Germanujo.
S-ro Henri Buret, Sainville (Eure-&-Loir) . Francujo.
S-ino Henri Buret, „ „ . „
F-ino Marie-Louise Buret, Sainvilie (Eure-&-Loir) „
F-ino Madeleine Buret, „ „ „
Rev. Kanoniko Chapeau, Prezidanto de la Franca de I. K. U. E. Blois, ... Francujo.
S-ro Claudius Colas, Montmagny (Seine-&-Oise) „
S-ro Ricardo Codorniu, Murcia . . . . . Hispanujo.
S-ino Bosch de Codorniu, „ . . . . . „
F-ino Cordoniu y Bosch, „ . . . . . „
S-ro Ed. Dehaullon, Vierzon (Cher) . . . Francujo.
S-ro Drudin, Lyon . . . . . „
S-ro Jules Forestier, Gex (Ain) . . . . . „
F-ino de Golleville, Montauban . . . . . „
F-ino Larroche, Paris . . . . . „
S-ro Eric Morison, Edinburgh . . . . . Skotujo.
S-ro Anton Otto, St. Georgenthal . . . . Bohemujo.
Rev. P-ro Parker, Prezidanto de I. K. U. E., Kilmyshall Ferns (Co Wexford) . . . . Irlandujo.
Rev. P-ro Poell, Prezidanto de la Nederlanda Sekcio de I. K. U. E. Tilburg . . . . . Nederlando.
S-ro H. F. Pothast, 's-Gravenhage . . . . „

F-ino Rousseau, Paris	Francujo.
D-ro Smulders, Udenhout	Nederlando.
Rev. P-ro Strauchen, Lützel b. Basel . . .	Svisujo.
S-ro Voltz, Paris	Francujo.
S-ino Voltz, „	„

Monoferoj por aĉetado de Standardo kaj Memorskribaĵo lasotaj en Lourdes:

S-ro Claudius Colas, Montmagny (Seine-&-Oise) Francujo, ...	4 Sm.
S-ro Jules Forestier, Gex (Ain), Francujo . .	4 Sm.
F-ino de Golleville, Montauban, „ . .	4 Sm.
F-ino Larroche, Paris, Francujo	4 Sm.
Rev. P-ro Poell, Tilburg, Nederlando . . .	1 Sm. 200
D-ro Smulders, Udenhout, Nederlando . . .	4 Sm.
	21 Sm. 200

La Kasistino:
F-ino M. LARROCHE.

Akcia Societo „Espero Katolika".

Bone marŝas!

Bone marŝas la aferoj de Espero Katolika!

Antaŭ kelkaj tagoj mi vizitis la provizoran administrantinon, fraŭlinon BORRET, kaj la redaktoron S-ron D-ron SMULDERS, por kontroli la librojn kaj dokumentojn de nia Asocio.

Tiam, je la unua fojo, mi spertis, kiom granda kaj grava estas la laboro de niaj du direktoroj, kiom multe da tempo ili dediĉas al la plenumado de siaj taskoj.

Kaj dank' al ilia fervoro, dank' al ilia sindonemo mi ĝoje rimarkis, ke nia afero pli kaj pli progresas, dank' al la agemeco de nia administrantino, dank' ankaŭ al la nelacigebla laboremeco de nia redaktoro,[1]) nia revuo Espero

[1]) Noto de la Redakcio. — Pro la oficialeco de tiu ĉi artikolo de la Prezidant-komisaro de E. K., la redaktoro opiniis ne havi la rajton, por forstreki la laŭdajn vortojn pri li mem.

Katolika ĉiam pli disvastiĝas kaj ĝia enhavo pli interesiĝas, tiom ke oni ĝin povas lokigi inter la plej gravaj eldonoj Esperantaj.

Al ambaŭ la katolikaj Esperantistoj ŝuldas multan dankon, jes, — sed ili ŝuldas pli!

Se mi diras, ke la nombro de niaj abonantoj kreskis dum la lasta jaro, tio ne signifas, ke ĝi estas sufiĉe granda. Ne! Multe ankoraŭ ĝi devas pligrandiĝi, antaŭ ol ni povos diri, ke E. K. estas firme starigita. Kaj tial ni ŝuldas *kunlaboron!* Ni ne lasu la tutan penadon al la direktoroj! Ni ilin helpu per niaj tutaj fortoj! Tion mi povas certigi: Se ĉiu nuna leganto de E. K. estos varbinta novan abonanton, nia afero floros, kaj fruktodona estos al la katolika movado. Ni ne forgesu tamen, ke bedaŭrinde ankaŭ inter ni estas mallaboremuloj, kaj tial mi alvokas vin, karaj samkredanoj: varbu du, tri, varbu kiel eble plej multe da novaj abonantoj, kaj ne lasu tiun laboron al aliaj!

Ho, se ĉiuj komprenus la utilecon, la *necesecon* de efika kunlaborado por nia Kredo! Nenion kontraŭ ni povus niaj kontraŭuloj, ni estus potencaj, la tuta mondo estus al ni, — ne, al Kristo!

Sed, por entuziasmigi ĉiujn por nia bela movado estas necesa katolika organo, kiu nin instruas pri la katolika agado ĉiulanda, estas necesa katolika organo Esperanta, kiu nure povas havigi al si senpere la plej kompletajn informojn.

Estas tamen vere, ke por multaj katolikoj nia revuo estas tro multekosta. En mia rondo almenaŭ mi konas multajn samreligiajn, kiuj nur pro tiu kaŭzo ne abonas al E. K. Ĉu por tio ne ekzistas rimedo? Jes, diversaj.

Unue: Ni antaŭ kelka tempo aranĝis en Nederlando legrondojn, en kiuj oni povas aboni al E. K. kvarope. Nia organizaĵo „Nederlanda Katoliko" pagas $^1/_5$ de la abonkostoj kaj ankaŭ ĉiu kunleganto pagas la saman parton, tiel ke, por ĉiu, nia revuo nur kostas 0:400 Sm. pojare, por kiu malgranda sumo oni ĉiumonate legas „Espero Katolika". Klopodu, amikoj alilandaj por ankaŭ en via ĉirkaŭaĵo starigi tiajn legrondojn. Tiel ni atingos diversajn personojn kiuj

alimaniere neniam ekkonatiĝus kun nia grava periodiko.

Dua rimedo: Ĉu ne estus ebla al E. K. eldoni ankaŭ malgrandan, malkaran periodikon, ĉu monatan, ĉu dumonatan, en kiu aperos kelkaj artikoloj jam aperintaj en E. K.? Mi tie-ĉi aludas la rubrikon „Katolika Vivo Ĉiulanda" de S-ro KOZMA, tiom interesa por ĉiuj. Mi pensas pri la „Oficialaj Sciigoj" pri I.K.U.E., tiom utilaj por la ĉiulandaj organizaĵoj aliĝintaj al nia tutmonda Unuiĝo. Mi celas la sciiĝojn pri niaj kongresoj, la okazintaĵojn en la diversaj landaj asocioj k.t.p., k.t.p.

Ĉar la artikoloj por tiu malkara gazeto — ni ĝin nomu ekzemple „Katolika Vivo" — povas esti similaj al tiuj de E. K., ĝia kompostado estos sama, ne demandos multe da nova laboro, kaj tial la prezo povas esti tre malalta.

Plue: la legado de tiu malkara folieto povas montri la gravecon de nia revuo „Espero Katolika" kaj tiel multfoje servos kiel enkondukilo por novaj abonantoj...

Mi nur esprimas ideon... Ĉu iu konas plibonan? Ĉu iu ĝin aprobas?... Ĉu iu volas ankaŭ ĝin priparoli?... Estas tie-ĉi, en E. K., la ĝusta loko por diskuti pri tio.[1])

Ekzamenante la diversajn librojn, leterojn, k.t.p. de E. K., mi ekrimarkis kelkajn aferojn, pri kiuj mi nepre devas paroli. Mi nun plene komprenas, kiom peza ŝarĝo premis la ŝul-

---

[1]) Noto de la Redakcio. — Ni opinias, ke la tuja efiko de la lasta rimedo estos plimalgrandiĝo de la abonantaro de E. K. Multaj kontentigos sin je tiu malkarega, sed la plej gravajn artikolojn enhavanta gazeteto. Sed malpliigo de la abonantoj de E. K. malebligos ĝian daŭran eldonon kaj samtempe la eldonon de la de ĝi dependa, malkara gazeto.

Laŭ nia opinio, ni bezonas unu kiel eble plej grandan kaj gravan oficialan organon, kiu ne povas esti pli malkara ol 2 Sm. (komparu la abonprezon de aliaj grandaj Esperantaj gazetoj). Nia prestiĝo postulas revuon, montreblan flanke de aliaj gravaj Esperantaj gazetoj.

Por la komencantoj, por la nacia propagando inter katolikoj kaj defendo kontraŭ atakoj de katolikaj neesperantistoj ni nepre bezonas *naciajn* Esperanto-gazetetojn, kiujn prefere *senpage* ricevu *ĉiu* membro de la nacia Ligo (kiel ekz. en Katalunlando kaj en Nederlando).

trojn de nia eksiĝinta administranto S-ro SLEIJFFERS, kiu, kvankam daŭre malhelpata per sia malsaneco, ĉiam entuziasme skribis pri sia E. K., kaj pli ol lia malfortiĝanta korpo permesis, dediĉis siajn fortojn al ĝia progresigo. Li certe ĝojos, kiam li rimarkos ke tiu laboro, kiun li kun granda peno ekkomencis, ne estis vana, sed ĉiam pli kompletiĝas.

Peza ankoraŭ estas la tasko de la nuna provizora administrantino, fraŭlino BORRET, kaj nia estas la devo, ĝin kiel eble plej multe plifaciligi. Ĉu tion ni povas? Jes.

Multe da skribado certe estus nenecese, se ĉiu tutkorekte farus sian devon.

Tro ofte okazas, ke interkorespondado *nure* estas necesa tial, ke abonantoj estas tro neakurataj. Oni ekzemple sendas monon por *tri* abonantoj, sendante *du* adresojn, aŭ — kio estas pligrava, — oni pagas por *du*, kaj sendas tri adresojn.

Aliaj skribas: „Sendu E. K. al suba adreso", kaj forgesas sendi monon.

Mi ne volas paroli pri tiuj, kiuj jam diversfoje ricevis admonon por pagi la abonprezon, kaj, kvankam eĉ nerespondinte tiun skribaĵon, ĉiam ankoraŭ akceptas la novaperintajn numerojn.

La leganto mem serĉu nomon por tia agadmaniero! *Tio ne plu okazos*! La nepagintoj de nun ne plu ricevos la sekvantajn numerojn.

Ankaŭ la diverslandajn abonejojn mi volas atentigi pri tio: Ne akceptu abonon sen antaŭpago, kaj ne donu novajn abonantojn al la administracio, ne sendante monon. De nun ni nur enskribos tiujn adresojn „pro memoro" kaj ne sendos la numerojn, antaŭ ke ni estos ricevintaj la abonmonon. Ordo estas necesa, des pli necesa, ĉar nia organizaĵo estas tutmonda. Neniu do malhelpu tiun ordecon, tiam certe, jes certe, bonan estonton renkonteniros nia revuo. Tion al ni garantias la sindonemo, al akurateco de la redaktoro kaj de la administrantino.

En la raporto pri 1912 la direktoroj skribis: „E. K. havas „posedaĵon. Granda kvanto da malnovaj jarkolektoj estas

„sendita al ni...” Tiuj antaŭaj numeroj enhavas diversajn interesajn artikolojn.

Gravajn faktojn ili komunikas pri la estinto de E. K. Diversaj jarkolektoj estas kompletaj. Plue ni posedas kelkajn librojn, kiuj enhavas la numerojn 1 ĝis 50.

Por kunmetigi nian bilancon ni taksis la valoron de tiuj presitaĵoj kaj fiksis la prezon, je kiu ili estas haveblaj ĉe la administracio.

Ĉio afrankite		
	Apartaj malnovaj numeroj kostos . . .	1 Sd.
	Duoblaj numeroj (32 paĝoj)	1,5 Sd.
	Kompletaj jarkolektoj	1 Sm.
	La numeroj 1—50	3,5 Sm.

Tiuj prezoj kompreneble nur valoras por la malnovaj jarkolektoj kaj ne estas rilataj al la nuna kaj estontaj E. K.-eldonoj.

Ĉiu kiu deziras kompletigi siajn jarkolektojn, ĉiu kiu volas informiĝi pri la historio de E. K., aŭ pliriĉigi sian bibliotekon per valoraj, bonlingvaj artikoloj Esperantaj, sendu siajn mendojn.

Mi finas.

Laboru, amikoj, helpu nian katolikan movadon, apogu la laborojn de tiuj, kiuj donas siajn fortojn al la disvastigo de Esperanto inter la Katolikoj, de la katolikismo inter la Esperantistoj, kaj *per* Esperanto tra la tuta mondo.

P. A. SCHENDELER,
Prezidant-Komisaro de E. K.

AL LA AKCIULOJ DE „ESPERO KATOLIKA”.

Laŭ artikolo 17-a de niaj Statutoj la direktoroj kun la komisaroj kunvenos antaŭ la 15-a de junio. Ĉar ili deziras fiksi tiam la agendon de la ĝenerala kunveno, okazonta tiun-ci jaron laŭ-statute en Lourdes, mi petas la akciulojn, kiuj deziras fari proponojn por la ĝenerala kunveno, ilin sendi al suba adreso **antaŭ la unua de junio.** Mi atentigas la akciularon pri jena decido de art. 23:

„En la ĝenerala kunveno ne estas permesate preni decidojn pri temoj, kiuj ne estas publikigitaj en la agendo."

La Prezidant-Komisaro de E. K.:
P. A. SCHENDELER,
Maria-Heide (Veghel),
Nederlando.

Kroniko de I. K. U. E.

X-a Universala Kongreso de Esperanto

Katolikaj Festoj en Parizo.

La Katolikaj Esperantistoj loĝantaj en Parizo, povas de nun certigi, ke okazos, dum la ĝenerala Kongreso de Esperanto, bela Katolika Diservo (verŝajne en la Baziliko de la sankta Koro, sur la supro de Montmartre, je kvin minutoj de la Kongresejo). Speciala komisiono estos kreata por zorgi pri tio, kaj ĝi oficiale rilatos kun la komitato de la Deka Kongreso.

Plue, diversaj Katolikaj kunvenoj estas projektataj, kaj ankaŭ propagandaj manifestacioj.

S-ro Kanoniko Chapeau, profesoro ĉe la Katolika Universitato predikos en Esperanto dum la Kongreso.

Franca Sekcio de I. K. U. E.

La Marta numero de „l' *Espérantiste Catholique*" alportas al ni ĝojigan novaĵon.

La *franca Ligo de Katolikoj Esperantistaj*, definitive organiziĝas, kaj ĝia Prezidanto estas de nun S-ro Kanoniko CHAPEAU, konata profesoro ĉe l' *Institut Catholique de Paris* (Katolika Universitato) kaj ĉe la granda seminario De Blois.

S-ro Kanoniko CHAPEAU estas ne nur eminenta scienculo, sed ankoraŭ *tre malnova* Esperantisto. Li lernis Es-

peranton en la jaro 1889, t. e. du jaroj post ĝia publikigo.

Li verkis bonegan boŝuron, dufoje represitan, sub la titolo *L' Esperanto, ses régles, sa logique.*"(1)

En *Paris*, la grupo „*N. D. de l' Espérance*" regule kunvenas ĉiumonate el la belega kunsidejo afable pruntita de Lia Kardinala Moŝto Mgr. AMETTE. Post legado de unu paĝo de la sankta Evangelio en Esperanto, la grupanoj aŭskultas la klarigojn de la Prezidanto, Abato Comptour, kaj unu el ili faras paroladon pri iu temo.

Post la kunveno, okazas Beno de la S. Sakramento, kun kanto de kantikoj kaj prediko en Esperanto.

La kunvenoj okazas la 4an dimanĉon de ĉiu monato, 76 Rue des Saints Pères.

KOREKTO DE ERARO.

Kara amiko Smulders!

Vi bonvolis min honorigi, la lastan monaton, per la enpreso en E. K. de mia poezio pri nia karega Prezidanto RICHARDSON.

Relegante ĝin en E. K. mi havis la grandegan surprizon vidi ke la vortoj:

„*En vilaĝo ĉarma de bela Franclando*", estis anstataŭitaj de tiuj vortoj:

„*En vilaĝo ĉarma de bela Svislando*".

Ĉar la poezion sekvas mia nomo kiel subskribo, mi nepre ne volas preni sur min la respondecon de tiu *geografia erarego.*

Bossey, kie mortis nia kara Patro RICHARDSON, kie liaj restaĵoj ripozas, estas franca vilaĝo, kaj nur diplomatia traktato povus ŝanĝi tion. Pretendi, ke Bossey estas en *Svislando*, estas eraro tiel grava, kvazaŭ aserti, ke Maastricht estas en Belgujo aŭ Germanujo.

---

(1) Prezo 0.50 Sm. ĉe la Katolika Oficejo, en Montmagny (Seine et Oise.)

Bonvolu, kara amiko, konigi tiun korektigon en la venonta numero de E. K.

Via, kun tutkora saluto

Cl. COLAS.

Noto de la Redakcio. — Ĝis nun mi opiniis, ke Patro RICHARDSON mortis en *Svisujo*, kaj anoncante la morton en E. K. (Okt. 1913, p. 234), mi skribis: „Subite estas mortinta en Bossey apud Genève (Svisujo)."

Pro tio mi opiniis, ke en la poemo („en ĉarma vilaĝo de bela *Francujo*") estis plumeraro, kaj anstataŭis „Francujo" per „Svislando".

„Oni estas neniam tro maljuna, por ke oni lernu", diras Nederlanda proverbo. Kaj supra eraro instruis la redakcion, esti pli singardeme estonte, antaŭ ol ŝanĝi vorton en la tekstoj.

Mr. TH. L. M. H. BORRET †

Membro de la Honora Komitato de „Nia Dua" en Hago; membro de la Nederlanda Ŝtatkonsilantaro; kavaliro en la Ordeno de la Nederlanda Leono; kavaliro de la Pio-ordeno; donacita je la Kruco „Pro Ecclesia et Pontefice";

naskita en Maastricht, 12 Novembro 1846 kaj mortinta en la Sinjoro en La Hago, 28 Febr. 1914.

La vizitintoj de la Dua Internacia Kongreso de Katolikaj Esperantistoj en Hago (1911) ankoraŭ bone memoros la respektindan ŝtatkonsilanton Mr. BORRET, kiu honoris „Nian Duan" per sia ĉeesto ĉe la malferma kaj la ferma kunsidoj. Li konvinkiĝis pri la vera valoro de Esperanto duonjaron antaŭ la Kongreso. kaj, kvankam okupante gravan pozicion en la societo, li tamen ne hontis, eĉ fieris publike montri sin konvinkita Esperantisto. Per tio li certe faris gravan servon al nia katolika Esperanto-movado, precipe en Nederlando. Ankaŭ li honoris la nacian gazeton „Nederlanda Katoliko" per artikoloj portantaj lian subskribon.

Tiu bonega samideano, tiel afabla al ĉiu, tiel simpla kaj agrabla en la konversacio, estis ne malpli bonega Katolika, kiu donis siajn fortojn al la katolika afero.

Katolikaj Samideanoj! kiel la kara mortinto servis nian aferon sur la tero, tiel ni reciproke servu lian animon per niaj preĝoj, por ke la bona Dio donu al li la eternan ripozon.

Korajn kondolancojn al lia respektata familio, precipe al la provizora Administrantino, filino de la kara mortinto.

D-ro SMULDERS.

Katolika Nigrulo-Esperantisto.

Uganda — La pasintan Kristnaskon al unu el la novaj baptitoj de la italaj misiistoj oni donis nomojn: personan JAKOBO, familian ESPERANTO. Li estas 30 jara bela nigrulo, edzo kaj patro. Tiel nia kara lingvo de nun resonos, kiel familia nomo, ankaŭ inter afrikaj nigruloj, kaj nia nova samnomano deziras scii, ĉu en la tuta mondo estas personoj, kiuj simpatias kun lia nomo. Pro tio ni petas niajn legantojn sendi al li ilustritan poŝtkarton, kaj se eble, *donacetojn*, ĉar li estas tre malriĉa, kaj estas por li grandega ĝojo eĉ malgranda donaco. Lia adreso estas S-ro JAKOBO ESPERANTO — **OMAK** Afriko, Uganda Protectorate — Missioni Italiane.

Adresaro de Katolikaj Esperantistoj.

Fontanafredda (Udine, Italujo) — Pastro Bianchini sciigis, ke **Adresaro de katolikaj geesperantistoj** havos grandegan sukceson; li jam ricevis pli ol 600 gravajn informojn preskaŭ el la tuta mondo, kaj petas rapidi sendon de novaj informoj, ĉar baldaŭ li komencos la presadon de tiu grava verko, kiu aperos en du lingvoj *Esperante* kaj *Latine*.

Eldono de Poŝtkartoj.

La „Katolika Esperantista Oficejo" en Montmagny (près Paris), Francujo, eldonis belajn poŝtkartojn kun la portreto de la benanta Papo Pio X kaj kun Esperanta teksto. La

tuto estas malgrandigita reprodukto de la bildo, kiu troviĝas sur la dokumento, kiun la kongresanoj de „Nia Kvara" portis hejmen kaj sur kiu oni legas en Esperanta lingvo (teksto offciale aprobita de la Vatikano) la favoron de „Apostolikan Benon kaj Plenarian Indulgencon „in artikulo mortis", kiam pentantaj, sed ne povante konfesi nek ricevi la Sanktan Komunion, ili alvokos per la buŝo aŭ per la koro, la tre Sanktan Nomon de Jezuo."

Sciigoj de la Redakcio.

Pro manko de loko ne povas aperi en tiu ĉi numero la artikolo de Prof. CART pri la kongreso de blindaj Esperantistoj, nek la rubriko „Katolika Vivo Ĉiulanda", k. t. p.

P-ro BIANCHINI petas korekti la jenajn preserarojn en lia parolado „Pri Katolikaj Misioj": Paĝo 118 anstataŭ *malgranda Anglujo* korektu *malgranda Belgujo*. Paĝo 114, 7-a linio, anstataŭ korbat**os** : korbat**as**.

Bibliografio.

---

15. *Karaktero.* — laŭ Mr. J. M. VAN STIPRIAAN LUÏSCIUS, *advokato en Hago.* Dua plivastigita kaj plibonigita eldono, tradukita laŭ la 6*a* eldono de l' Nederlanda originalo, kaj kontrolita de la Esperantista Literatura Asocio Hago 1913. Librejo „Espero": prezo 0·200 sm.

Tiu-ĉi meritplena libro intencas edukadi al pure homaj virtoj. Ne estas uzebla al ni, kiuj estas homoj, kaj kristanoj. Ni konsideras la religiemecon kiel fundamenton plej solidan, kiel la esencon de edukado. Foerster iam ie skribis: „Pure morala, senreligia pedagogio deŝiras homon." La nura forteco, kiu alkondukas infanon al memregado necesa kaj postulita por observado de la leĝoj moralaj estas ofte *la religio.* Nu, pri religio mi trovis tiunĉi neplaĉantan linion en paĝo 6*a*: „Karaktero lasas ĉian kredon

netuŝita kaj povas harmonii kun ĉia religio, sed ĝi iras laŭ nenies kondukilo."

En sekvanta ĉapitro: „Kiel oni formas karakteron?" la aŭtoro denombras sep faktorojn de karakterformado. La precipa faktoro, *la religio*, ne estas nomita.

Nederlandanoj. kiuj deziras esti instruitaj plenege pri karaktero, legu libreton de lia Jesuita moŝto P. VAN LUIK: Godsdienst in de karaktervorming. (Religio kaj karakterformado. E. V. D. VECHT, Amsterdam.[1])

16. D-ro J. B. MARCHLEWSKI, *Ekonomio socia*. Kio ĝi estas kaj kion ĝi instruas. Krakovo. Esperanta scienca kaj literatura libraro. 1912. Prezo 10 sd.

Kvankam ekonomio socia estas „scienco pri la socia mastrumado, havanta kiel taskon klarigi, kiel formiĝas la rilatoj inter la homoj, penantaj trankviligi siajn materialajn bezonojn, kia estas la reciproka dependeco de tiuj-ĉi homoj pro tiu penado" — paĝ. 6*a* — ĝi tamen ne estas nedependa de la kristana moralo. Ĝi devas atenti pri la leĝoj etikaj, kaj pri la libereco de homa volo. Tion forgesis Doktoro MARCHLEWSKI. Li nenie elparolas la nomon de ia super-materiala ideo. Pro tio, lia verko ne estas manumebla por Katolikoj. Ni ne scias, ĉu rekomendinda esperanta ekonomia libro ekzistas.

La **Italoj** posedas i. a. *Liberatore*,[2]) la **Francoj** *Périn*, (Premiers principes d' économie politique, Victor Lecoffre, Paris) kaj *Antoine* (Cours d' économie sociale, Guillaumin et Cie, Paris); la **Germanoj:** *Pesch, Cathrein, Ratzinger;* la **Nederlandanoj:** BRUIN, S. J. *Sociologische Beginselen*, Nijmegen, Malmberg k. t. p.

17. *Tutmonda Biblioteko je la memoro de Leo Tolstoj.* Naŭ numeroj tre malmulte-kostaj jam aperis. La legado

---

[1]) Noto de la Redakcio. — Alinaciaj pastroj estas petataj konigi bonegan libron pri edukado, uzeblan por siaj samlingvanoj.

[2]) ankaŭ france tradukita: Principes d' économie Politique — Oudin, rue de Mézières, 10, Paris.

de la plimulto da Tolstojaj verkoj estas malpermesata al Katolikoj.

Oni estu avertita!

Kiam, kiam niaj ĉefaj apologiaj verkoj estos tradukitaj Esperanten kaj aĉeteblaj tiel malmultekoste?

18. *Oficiala Jarlibro de U. E. A. 1913.* Rue de la Bourse, 10, Genève; 1 sm. *Tia libro estas elokventega propagandisto* de Esperanto. Kontraŭuloj foliumintaj ĝin certe konvertiĝos — ho! ke ofte ni harpiantaj gazetistoj bonvolu preni kaj legi!

Esperanto jam multege progresis. Kaj U. E. A. estas potentega helpisto de nia mondlingvo. Koni U. E. A., tio signifas ŝati ĝin. Ĉu ŝati ĝin signifas ankaŭ apogi ĝin? Persone kaj mone?

19. *Migrukunmi — Poŝpreĝareto* enhavante (a?) la plej necesajn preĝojn, instruaĵojn kaj vivregulojn por katolikaj junuloj kaj viroj, verkita de J. Saŭren, paroĥestro. El la germana lingvo esperantigita de Francesko de Paŭla Clemente, paroĥestro de Sincing. Kevelaer, Butzon kaj Bercker. Mark 1.50.

Pri tiu-ĉi libreto ni legis en Germana Esperantisto (20 Aug. 1913 — (B.) Bibliografio:

„La ekstera impreso de la libreto estas bona kaj tute inda por preĝaro. Tamen ni devas treege bedaŭri, ke la bonfame konata firmo oferis la monon por la eldonado de tiu-ĉi libreto, ĉar la traduko estas tiel terura, ke io simila ĝis nun apenaŭ estis trovebla en la literaturo de nia lingvo. Citi tie-ĉi ankaŭ nur la plej gravajn erarojn, estas tute ne eble pro ilia grandega nombro. Preskaŭ neniu paĝo estas aprobinda. Ofte la traduko de la unuopaj germanaj vortoj simple estas metitaj laŭvice unu apud la alia sen konsidero, ĉu la tuta frazo redonas la enhavon de la germana, tiel ke oni kelkfoje nur pene povas diveni ĝian veran sencon, eĉ se oni ne atentas la multajn gramatikajn kaj presajn erarojn. Precipe ĝenas la leganton la nekorekta

apliko de multaj simplaj vortoj, la troa kaj malĝusta uzado de diversaj sufiksoj kaj de la adverba formo de l' participo, plue la ofte tre strange faritaj kunmetitaĵoj. Same oni devas mallaŭdi la laŭgermanan desigon de l' verbo de la subjekto — k. t. p. La tuta fuŝtraduko estas klarigebla nur tiamaniere, ke la tradukinto, apenaŭ fininte rapidan trastudon de la gramatiko, jam prenis la germanan eldonon de la preĝareto kaj fabrikis la esperantigon per la helpo de vortaro. Tiel ankaŭ la nekalkuleblaj stilaj abomenaĵoj estas kompreneblaj, ĉar la tradukinto ŝajne neniam legis bonan literaturan verkon aŭ parolis kun vera esperantisto. La malutila eldonado de tiu ĉi nematura manuskripto certe estus evitita per uzo de l' helpo de la E. L. A.

O. F. Katoliko.

Estas severa sed tre prava recenzo. Kontraŭe ni tre rekomendas: Spirita Juvelaro (Katolika preĝolibro) tole hindita 0.83 sm. + afrankaĵo. A. N. GOVERS, Westeinde 6, den Haag.

20. *Frato Izidoro.* Katolika kantikareto enhavanta: 1e Elekton de ordinaraj preĝoj. 2e Kolekton de Kantikoj laŭ popolaj ĉiekonataj arioj. — 3a eldono pligrandigita. Prezo: 35 centimoj — afrankite. Katolika Oficejo Esperantista, 7 rue des Marronniers — Montmagny (près Paris, S. et O.)

Tre praktika libreto por kunvenoj, esperantaj tagoj kaj kongresoj Kiom belsonas nia lingvo! Gustumu vi mem, kara leganto, kaj juĝu:

La Sinjora preĝo.

Patro Nia, kiu estas en la ĉielo, sankta estu via nomo; venu regno via; estu volo via kiel en la ĉielo, tiel ankaŭ sur la tero. Panon nian ĉiutagan donu al ni hodiaŭ, kaj pardonu al ni ŝuldojn niajn, kiel ni ankaŭ pardonas al niaj ŝuldantoj, kaj ne konduku nin en tenton, sed liberigu nin de l' malbono. Amen.

Komparu, mi petas, tian melodion kun la kripla Esperantaĉo de la ĵus kritikita preĝareto.

Patro nia.

Patro nia, kiu estas en la ĉielo, sankta estu via nomo, venu *al ni via regno, fariĝu* via volo kiel en la ĉielo, tiel ankaŭ sur la tero.

Donu al ni hodiaŭ nian panon ĉiutagan kaj pardonu al ni *niajn pekojn*, kiel *ankaŭ ni* pardonas al niaj *ofendintoj*, kaj ne konduku nin en tenton, sed liberigu nin *de la* malbono. Amen.

Kiom da metrojn la simpleco, la precizeco, la bonsoneco jam flugis for!

H. LINNEBANK.